

La Kalumeto

la bulteno de “Projekto Indiĝenaj Popoloj »
januaro-marto 2012

« Projekto Indiĝenaj Popoloj » celas prezenti Esperanton al indiĝenaj popoloj tra la mondo kaj faciligi komunikadon inter indiĝenaj popoloj kaj individuoj per Esperanto. Ĝi celas ankaŭ informi esperantistojn pri la situacioj de indiĝenaj popoloj kaj pri kiel popoloj indiĝenaj kaj ne-indiĝenaj povas interagi. Ni kredas ke indiĝenaj popoloj ofte alfrontas similajn situaciojn, exemple: perdoj de terenoj, mondoperceptoj, kaj tradicioj. Ni plu kredas ke komunikado, per Esperanto aŭ alimaniere, helpas indiĝenojn subteni unu la alian kaj pli bone diskonigi siajn kulturojn. Samtempe, PIP komprenas ke multaj indiĝenaj grupoj sentas profundan bezonon revivigi, gardi, kaj antaŭenigi siajn proprajn lingvojn.

Indianaj junuloj translimas

Sub la aŭspicoj de Ilisagvik College (kolegio) en la urbo Barrow, Alaska, Usono, funkcias programo de internacia interŝanĝado de indiĝenaj junuloj de la ŝtato Alasko kaj Meksiko. La programo ekzistas jam dum kvar jaroj. Ĝi celas junulojn kiuj aspiras administri natur-rimedojn kaj protekti la lokan/mondan natur-medion.

La programo de du-landa studado, kiu kutime inkludas unu monaton de lernado kaj laboro en Alasko kaj unu en Meksiko, estas interesa ne nur pro sia internacieco, sed ankaŭ pro tio ke ĝi baziĝas je kontaktoj kun scienculoj kaj indiĝenaj “kultur-portantoj,” precipe pliaĝuloj de lokaj indiĝenaj grupoj. Subtenas la programon la Landa Scienco-Fondaĵo de Usono, kun partoprenado el diversaj grupoj kaj instancoj de Barrow. (Meksika partoprenado limiĝas je la individua nivelo (scienculoj, pliaĝuloj, kaj gastigaj familioj).

Estis neniuj mencio en la artikolo pri la lingvaj aspektoj de la programo, kiu okazas en du landoj kies enloĝantoj parolas nesamajn lingvojn, kaj kies indiĝenaj pliaĝuloj eble parolas lingvojn krom la landskalaj lingvoj. La “ne-informoj” en la artikolo tre laŭtas!

Informofonto: “Ilisagvik College Links People in Alaska, Mexico” [La Kolegio Ilisagvik Konektas Homojn en Alasko kaj Meksiko], Tribal College Journal of American Indian Higher Education (TCJ) [La Gazeto de Tribaj Kolegioj pri la Supera Edukado de Usonaj Indianoj], vinto 2010

Reservejoj: Ĉu grandaj aŭ malgrandaj?

Kiam mi pensas pri la vorto “reservejo” rilate indiĝenojn, mi plej ofte pensas pri reservejoj kiuj rekte ŝirmas homojn—fakte, rezervejoj por homoj. Sed en la kvara numero de Nature Conservancy de 2011, artikolo aperis pri fiŝ-reservejo en Novgvinea Papualando kiu montris al legantoj ke aliaj specoj de reservejoj ankaŭ povas gravi por la indiĝenaj gentoj de la mondo.

Temas pri fiŝ-reservejo apud la novgvinea-papualanda insulo Novirlando, kie troviĝas manĝebla fiŝo (el generoj Epinephelus kaj Myctoperca). Pro tio ke la

du-genera fiŝo estas multe manĝata en aziaj urbegoj kaj multe kaptata en Novirlando, la kvanto de la fiŝoj draste malgrandiĝis dum antaŭnelongaj jaroj. Ofte oni penas protekti bestan aŭ plantan stokon per starigi grandan reservejon. Se la apudaj kaptistoj aŭ kolektistoj observas la reservejan malpermeson, la starigo de reservejo ofte permesas gravan pligrandiĝon de la kvanto de la celita besto aŭ planto. Aliflanke, granda reservejo ankaŭ povas grave malriĉigi la homojn kiuj fiŝas, ĉasas, aŭ kolektas la sovaĝan beston aŭ planton.

Pro tio gravas la eltrovo flanke de la scienculoj kiuj studas na *Epinephelus* kaj *Myctoperca*. Ili eltrovis ke grandaj reservejoj ne estas necesaj por protekti la fiŝostokon; nur estas necesaj reservejoj kiuj ŝirmas la frajejojn (impregnejojn) de la fiŝoj.

Kial, oni rajtas demandi, tio gravas al indiĝenoj kaj al tiuj, kiuj interesiĝas pri ili? Jen unu kialo: Se fiŝkaptisto povas kapti altvalorajn fiŝojn en grandaj, ne-reservejaj marregionoj, sed ne grave malplialtigi la fiŝostokon ĉar li ne kaptas en la frajejoj, li povas daŭre subteni sin kaj ne bezonas lasi sian tradician loĝregionon. Por homoj kiuj vivas laŭ tereno-rilatataj maniereoj, kiel tradiciaj indiĝenoj oftege faras, restado ĉe la kutima tereno tipe permesas la daŭrigadon de la tradiciaj rilatoj inter ekonomia vivo, kultura vivo, kaj geografia areo.

Do, fiŝo-reservejoj: ĉu grandaj aŭ malgrandaj? La demando havas signifon! Homoj al kiuj gravas la maroj kaj la homaj socioj montras al ni kiel la fiŝoj kaj la tradiciaj fiŝokaptistoj povas daŭripove kunekzisti, kaj kiel la fiŝkaptaj kulturoj de Novgvinea Papualando povas funkcii kiel eroj de la nuna internacia ekonomio.

“La Lingva Vojaĝanto” iras al Belizo

Interesa por lingvemuloj estas la lingva situacio de la eks-kolonio Belizo, nun la plej norda lando de Centrameriko. En tiu lando, la oficiala lingvo estas la angla, sed ĝi ne estas la kundividita lingvo de la lando; la vere kundividita lingvo estas la beliza kriola. Pro la fakto ke la beliza kriola estas la ponto-lingvo de la diversaj gentoj kiuj loĝas en Belizo, la lingvo, kvankam ne oficiala, estas “landa lingvo,” kun la garafuna, la hispana, kaj tri dialektoj de la majaa. En Belizo, “landa lingvo” estas lingvo rekonita kiel grava en la socia vivo de la lando. La beliz-kriola, en kiu anglalingva vortostoko kombiniĝas kun gramatikaj konceptoj de afrikaj lingvoj, havas skribitan formon kiu uzas la latinan alfabeton. Probable ne-koincide, tiu estas la alfabeto de la angla kaj la hispana, la du lingvoj kiujn oni parolas ne nur en Belizo, sed ankaŭ en pluraj aliaj landoj.

La beliz-kriola antaŭnelonge altiris internacian intereson ĉar landskale konata kantoverkistino de Belizo, Leela VERNON, prezentis al sia samlandanaro kriolan version de la teksto de la landa himno. (kriole: “Land a da Free”; angle: “Land of the Free”; esperante: “Lando de la Liberaj”). S-ino Vernon komentis ke ŝi faris la tradukon pro tio ke ŝi kredas ke multaj belizanoj parkere scias la (oficialan) anglalingvan version de la himno, sed ne plene komprenas ĝian signifon. S-ino Vernon estis konata en Belizo kiel subtenanto de la beliza kulturo kaj la beliza kriola lingvo. Certe, ŝi servis sian landon per pli profunde konigi la himnon, grava ero de tutlanda kulturo kaj landaneco, al la tuta loĝantaro.

Fontoj: “PRI’s ‘The World’” kaj www.belizianjourneys.com.

Esperanto kaj indiĝenoj—mesaĝo de la redaktoro

Kiam mi unue interesiĝis pri la rilato inter Esperanto kaj indiĝenoj, mi kredis ke Esperanto povus esti utila al indiĝenoj kiam ili bezonus aŭ dezirus kontakti kaj interagi kun alilandaj indiĝenoj. Ekzemple, en sudokcidenta Usono kaj nordokcidenta Meksiko, estas dezertaj gentoj kiuj eble dezirus komuniki, kvankam en siaj landoj ili parolas malsamajn landskalajn lingvojn.

Post plurjara observado de la lingvaj situacioj de diversaj indiĝenaj grupoj, mi komprenas ke mia antaŭa ideo estis nesufiĉa. Mia nuna percepto jenas: pro diversaj kialoj, multaj indiĝenaj lingvoj, (inter ili pluraj kiuj havas multajn parolantojn) estas en riskaj situacioj. La risko en multaj kazoj estas ke la lingvo malaperos, kiel jam ofte okazis en la pasinteco. Feliĉe, pluraj indiĝenaj grupoj ne akceptas la perdon de siaj lingvoj kaj organizas sin por kontraŭi tiun perdon. Samtempe, kelkaj lingvistoj profunde interesiĝas pri la konservado kaj revivigo de indiĝenaj lingvoj, kaj laboras tiucele kun indiĝenaj gentoj kaj unuopuloj.

Pro la ĵus-menciitaj situacioj, mi nun komprenas ke por tiu indiĝeno kiu interesiĝas pri lingvaj kaj kulturaj demandoj, la grava kaj vivosubtena afero ne estas internacia aŭ intergenta lingvo, ĉu Esperanto aŭ ĉu alia; la grava afero por li aŭ ŝi estas la indiĝena lingvo de li aŭ ŝi mem, aŭ, se tiu lingvo ne plu vivas, la kulturo (ofte kaduka) de la gento de tiu persono. Mi emfazas ke la rezulton de tiu revivigo oni taksu ne nur laŭ lingva vidpunkto, sed laŭ la vidpunkto de la memkoncepto de individuoj kaj la socia kohero de grupoj ofte malaltetime taksitaj de neindiĝenoj de la koncerna regiono.

Post kiam mi komprenis la aktualajn situaciojn de lingvoperdoj kaj lingvo-revivigoj kiujn multaj indiĝenoj travivas, mi reformis mian konceptaron pri la rilatoj inter Esperanto kaj indiĝenaj lingvoj kaj homoj. Jen mia nuna konceptaro, kiun mi pretas priparoli kun iu ajn interesulo:

---Esperantistoj pli informiĝu pri indiĝenaj kaj etnaj kulturoj, kaj tiel gustumu pli el la lingvoj kaj kulturoj de la mondo. Ankaŭ, ili pli bone komprenu la diversajn laboron de lingvo-revivigoj kaj la psikologian valoron de tiuj revivigoj.

---Esperanto iĝu lingvo en kiu riĉe reprezentiĝas materialoj pri kaj el indiĝenaj kulturoj, ekzemple, rakontoj, kantoj, priskriboj de ceremonioj kaj tradicie okupitaj terenoj, kaj ĝi ofertu al interesuloj kontakt-informojn pri indiĝenaj organizoj.

Kiam mi iĝis esperantisto, mi ne timis pri la estonteco de mia denaska lingvo, (la angla). Pro mia fido pri la estonteco de tiu lingvo, mi estis en bona kondiĉo antaŭenpaŝi de mia denaska lingvo kaj la lingvo kiun mi akiris per lerneja studado (la hispana) al internacia pontolingvo. Se mi estus indiĝeno, mi eble havus tute alian agendon: enfokusigi min ne je la internacia lingvo-situacio, sed je la sitacio kiu rilatas al mia etna identeco kaj ĝia valoro. En tiu intima laboro, mi kredas ke Esperanto ne havus rolon. Aliflanke, Esperanto kaj esperantistoj ja havas rolon je la subteno de homoj kaj organizoj kiuj favoras la ekziston kaj prosperadon de mondskala lingva diverseco kaj la fieron de tiuj, kiuj havas sanan, kreaan kontakton kun sia pasinteco kaj identeco.

Mi esperas ke esperantistoj penos kompreni la vidpunktojn de homoj kiuj fidis pri la kohero kaj estonteco de sia lingvo, sed kiuj samtempe kredas ke sia lingvo endanĝeriĝas. Kiam temas pri respekto kaj subteno por la lingvoj kaj kulturoj de la mondo, mi kredas ke esperantistoj kaj indiĝenoj povas ŝpini fortan, kolorriĉan fadenon inter si.

Respondo de leganto

Paulo Roberto De Freitas Carvalho (Paulo Kverko) de Brazilo skribas, "Mi tre ŝatis ĉefe la artikolon pri la verbo "naski" laŭ la kompreno de la Burundanoj. Nur Esperanto ebligas al ni la konon de monda kulturo."

Aina poemo pri la tertremo en Japano

(La aina virino UKAZI Sizue verkis ĉi tiun poemon. Mi dankas al s-ro KIMURA Goro, ano de PIP, kiu sendis al mi la tradukon el la japana en Esperanton kaj kiu afable skribis la enkondukon.)

Enkonduko: La verkinto estas 78-jaraĝa estrino de Kunliga Organizo de Ainoj Loĝantaj en Tokio. Kiel eble estas konate al legantoj, ainoj estas praloĝantoj de Hokkaido, insulo de norda Japanujo. Unu semajnon post la tertremego en Japanujo (11-an de marto 2011), malfrunokte la 18-an de marto, la verkinto sentis kvazaŭ vortoj de Dio (=laŭ tradicia mondrigardo de Ainoj, Dio videblas kaj sentebblas en diversaj naturaĵoj, kiel ekzemple, bestoj, fajro, aŭ tero) falis sur ŝin kaj ŝi skribis la poemon. Ŝi sentis ke la tertremo estis signo de doloro kaj pezo kiun la tero sentis, pro misago de homoj kiuj perdis estimon al ĝi. La originala lingvo estis la japana, sed la poemo klare respegulas la mondrigardon de ainoj. (Intertempe, la poemo estis tradukita en la ainan lingvon.)

HO, TERO

Ho, Tero

Pezis, ĉu?

Doloris, ĉu?

Pri vi

Pli profunde rimarki,

Respekti,

La pezon

Kaj doloron

Scipovi

Ni devis.

Multaj

Kun viaj

Pezo kaj doloro

Pereis en ondoj

Kaj

Reiris al Tero.

Tiun doloron

Nun ni

Multaj postrestantoj

Plene rimarkas.

Kaj kun estimo

Niajn manojn faldas.

El: Simon Bolivar: The Liberator of Latin America [Simon Bolivar: La Liberiginto de Latinameriko] fare de (s-ro) Robert Harvey'

“La anda montaro de Peruo karakteriziĝis je montoj tiom krutegaj kaj valoj tiom mallarĝaj kaj krutaj ke la inkaoj povis regi sian civilizacion per du metodoj: ĉizi etendan monto-valan pado-reton, kaj krei terasojn de la valoj ĝis la mezaltecoj de la montoflankoj, kie ili kultivis diversajn plantospecojn, kaj lerte direktis la akvon kaj la teron. [...] La inkaa sistemo estis komunuma laŭ neceso, starigita je rigoraj principoj de hierarkio kaj kunlaboro, kiel estis necese por gento kiu povis transvivi nur per kuna strebado: prizorgado kaj prilaborado de la terasoj.

“Sur la pinto de tiu speciala piramido la hispanoj aldonis la propran kolonian regadon, kiu ankaŭ estis senkompatate hierarkia; ĝi uzis indiajn laborestrojn por trudi al la indianoj preskaŭan sklavecon. Dum la hispanoj daŭre elprofitis agrikulturon, ili kreis ankaŭ grandan klason de devig-laborantoj por labori en la minoj de oro, arĝento, kaj stano. La hispanoj kultivis la koka-folion por ke la indianoj uzu ĝin por mildigi sian malsaton kaj suferadon; la foliojn, siavice, oni devis kultivi en la profundaj tropikaj valoj, laboro kiu mortigis milojn da indianaj kultivantoj.

“La Liberiginto heredis tiun sistemon de ekspluatado kaj preskaŭ-sklaveco, kaj oni devas agnoski ke li plenumis la esperojn de sia titolo, kvankam, fakte, liaj dekretoj plejparte ne estis efektiveblaj. [...] Bolivar skribis private de [la urbo] Cuzco, “La kompatindaj indianoj sin trovas je vere konsterna cedado-stato. Mi deziras ĉiel helpi ilin. Unue, por servi la homaron, kaj due, pro tio ke ili havas tiun rajton.”

Profetaĵo de la hopi-gento

De Thomas BANYACYA Sr., Pliaĝulo de la hopi-gento

Jam venis la dek-unua horo.

Nun vi devas diri al la popolo

Ke la NUNA horo gravegas,

Ke ekzistas konsiderindaĵoj.

Kie vi loĝas? Kion vi faras?

Kun kiuj estas viaj interrilatoj?

Ĉu vi estas en la ĝusta interrilato? Kie estas via akvo?

Konu vian ĝardenon.

Venis la horo por diri la veron.

Kreu vian komunumon, agu afable unu al la alia.

Ne serĉu ekster vi mem por trovi estron.

Estas nun rivero kiu rapide fluas.

Ĝi estas tiel granda kaj rapidmova

Ke kelkaj homoj timos;

Ili penos manteni la riverbordon.

Ili sentos ke ili distiriĝos

Kaj ili multe suferos.

Komprenu ke la rivero scias sian ircelon.

La pliaĝulo diras ke ni devas malteni la riverbordon.

Eknaĝu al la rivercento,

Tenu la okulojn malfermitaj kaj spiradu.

Kaj mi diras: Vidu tiujn kiuj estas kun vi.

Forte tenu ilin kaj festu!

Je la aktuala momento,

Ni nenion perceptu egoisme,

Precipe nin mem!

Se ni egoisme eraros,

Niaj spiritaj kreskado kaj vojaĝado jam finiĝos!

Kunigu sin!

Eksigu la vorton "lukti" de

Via sinteno kaj vortostoko.

Ĉion, kion ni nun faras, okazu

Laŭ sankta maniero kaj festa kialo.

Ni ĉiuj ekvojaĝadas.

Ni estas tiuj, kiujn ni atendas.

La Danco de la Vivo

“Kiel maskoporta dancanto inter la Kwakwaka’wakw-gento (indiana gento de Kanado), mi je nenombreblaj okazoj travivis tiun momenton [tuj antaŭ la eko de ceremonia danco]. Estas momento kiam la tuta mondo alilokiĝas. Mi estas tute sola. Mia universo estas la formo de la masko kiu kovras mian vizaĝon. Mi estas la masko. Mi estas la birdo. Mi estas la besto. Mi estas la fiŝo. Mi estas la spirito. Mi ene vidas mian dancon. Mi primeditas ĉiun korpomovon. Mi transcendas en la estaĵon de la danco. Junaj dancantoj nomas tion “hiperdancado”. Subite, la sordiga silento eksplode iĝas kakofanio—birdoj kantas, bestoj muĝas, la filik-folioj sonatas pro vento. Ĉiu estaĵo havas voĉon. Kvarfoje la sonoj kaj silentoj kolizas, tiam la granda danco komenciĝas.

Laŭ legendo, junulo ekhavis malbonan rilaton kun sia patro, kiu estis ankaŭ tribestro. La junulo deziris rebonigi la rilaton; li decidis kapti tetraonon por sia patro. La junulo eniris arbaron ĝis kiam li atingis maldensejon. Tie li pretigis sian kaptilon kaj sin kaŝis. Baldaŭ, pro la suna varmo, li ekdormis.

Magie, eta tetraono eliris la arbaron por stari ĉe la maldensejo, tiam reiri al la arbaro. Trifoje la eta birdo eniris kaj eliris, sed la kvaran fojon ĝi restis en la maldensejo kaj dance ĉirkaŭiris ĝin dum ĝi alvokas ĉiujn arbar-loĝantojn al la danco. Unue, la Arbostumpo viviĝis, poste la Enirejo al la spiritomondo de la arbaro. Birdoj ekpartoprenis, kaj la animoj de la kranioj kovritaj de arbara likopodio. Bestoj dancis, kaj fiŝoj foriris siajn riveretojn por povi partopreni.

Fine, la homoj alvenis, kaj unu el ili estis akuŝistino kiu helpis dum gravedulino dumdance naskis du infanojn. Mi estis unu el la du infanoj en la granda danco de la vivo kiam mi unuafoje portis maskon. Komence, oni kaŝis nin sub litkovriloj, kaj ni sekvis la fluon, ĉiam maldekstruman, de la danco ĉirkaŭ la fajro. Ni marŝis inter la akuŝistino kaj la patrino, antaŭenigitaj de mildaj manoj, ĉar ni apenaŭ vidis per la okulotruoj de niaj maskoj. Laŭ iu antikva proceso, ni “naskiĝis,” plene videblaj en la mondo de la Granda Domo.

La lasta estaĵo kiun oni alvokis al la danco estis la long-beka korako. De podio super la ĉefpordo de la Granda Domo, li malsuprenflugis por kunfesti la vivon kun la dancantaro. La tetraono ripetis sian kanton ĝis kiam la miraklo de la dancosceno denove estis malantaŭ la kurteno.

La filo de la tribestro vekiĝis de sia profunda dormado. La sonĝo estis al li klara en la menso. Li sentis devon diri al sia patro pri la granda beno kaj supernatura evento kiuj alvenis pro sonĝo. Tiam la rilato inter la patro kaj la filo resaniĝis. Okazigi la dancon iĝis la ĉiama rajto de la tribestro kaj siaj posteuloj.

Fonto: El eseo de Robert JOSEPH en la ekspozici-katalogo Doŭn from the

Shimmering Sky pri la arto de la indiĝenoj de la sudokcidenta marbordo de Kanado kaj la nordokcidenta marbordo de Usono.

Rekantaĵo—Jes, mi denove kaj same kantas—Bonvole kontribuu viajn reagojn, travivaĵojn, opiniojn, demandojn....

Indiĝenaj popoloj estas internacia fenomeno, kaj Esperanto estas internacia lingvo; La Kalumeto do estu internacia kunlaboraĵo! La Kalumeto ĉe Erik Felker / 414 E. Cedar Ave. Apt. 11 / Burbank CA 91501 /U.S.A. ejfelker@dslextrême.com